

Festivala Folio

BJELOVAR
2017
INTER-FEST
KROATIO

n-ro 2
dimanĉo
la 6-an de aŭgusto
2017

KURIERO DE INTER-FEST

LA FESTIVALO KOMENCIĜIS! VIVU LA FESTIVALO!

Por la Loka Festivala Komitato (LFK) sabete estis la D-tago! Ekde la frua mateno oni streĉe laboris, kio por multaj festivalanoj ne estis videbla.

Je la 8h00 el Zagrebo jam startis speciala buseto, kiu al Bjelovar venigis malgrandan grupeton da "fruaj hirundoj".

La LFK-anoj tiumomente jam preparis la Akceptejon en la Hotelo Central, kaj la gevolontuloj el Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo (Mihaela, Andrea kaj Robert) pretigadis viajn nomŝildojn.



Robert, Andrea kaj Mihela ĉe la Akceptejo

Specialaj helpantoj (Roberto Maglica kaj Vlado Popović) estis senditaj per aŭtomobiloj al la Flughaveno de Zagrebo por atendi kaj veturigi al Bjeloaro niajn gastojn en Rusio kaj Litovio.

Francaj muzikistoj Françoise kaj Dédé iris rekte per sia aŭtomobilo de Zagrebo al Ĝurđevac, kie ili atendis la antaŭfestivalan ekskurseton.



Granda afiŝo ĉe la enirejo de la Hotelo Central, kiu sciigis, ke ĉi tie okazas INTER-FEST

Oni pretigis la festivalajn sakojn kun abundo da materialoj kaj donacoj, muntis teknikaĵojn kaj okupiĝis pri diversaj lastmomentaj taskoj.

La festivala kasistino s-ino Polašek zorge okupiĝis pri diversaj listoj kaj pagoj.

Kun unuhora malfruo okazis ankaŭ la antaŭfestivala ekskurseto al Ĝurđevac. Sen malfruo komenciĝis la ekspozicioj en la Urba muzeo, prezento de la *Oklingva vortaro* de Jozo Marević kaj la Interkona vespero.

La Festivalo komenciĝis! Vivu la Festivalo!



VIZITE AL KOKOJ!

Malgranda grupeto konsistanta el 15 festivalanoj, vizitis la urbeton Đurđevac, kiu situas je 25 kilometroj de Bjelovaro. Ĝi estas konata kiel urbo de Kokoj. La vorto *Kokoj* estas intence skribita versale, ĉar temas pri la kromnomo de la civitanoj de Đurđevac, ricevita pro la legendo el la tempo de la turkaj invadoj. Laŭ tiu legendo, la militistaro komandata de Ulama-bejo, sieĝis la fortikaĵon de Đurđevac, klopodante malsatigi la defendantojn. Kiam en la fortikaĵo restis nur unu koko, maljuna kamparanino konsilis al la kapitano de la urbo meti ĝin en la kanontubon kaj pafi al la turka tendaro. La ruzaĵo efikis sukcese, kaj la foriranta Ulama-bejo malbenis la loĝantojn, donante al ili la ofendan nomon *Picoki*, kio en la loka dialekto signifas Kokoj. Sed, nun tiu kromnomo estas portata kun fiero.

La ekskursantoj vizitis la lokon de la turka malvenko, ĝuis la pentraĵojn en la galerio *Ivan Lacković Croata*, kiu troviĝas en la subtegmentejo de la fortikaĵo, kaj poste spertis ankaŭ la multmedian prezenton de la legendo, ĉirkaŭ kiu ĉiujunie plektiĝas ankaŭ turisma aranĝo *Picokijada*.

Kvankam la tago estis varmega, nenio venkis niajn ekskursantojn, ĉar la lokon por ripozi ili trovis en la restoracieto en la teretaĝo de la fortikajho. La ghuon iomete malbonigis la kelnero, kiu intermiksitis la menditajn telerojn kaj problemigis la pagadon. Sed, malbonajn impresojn oni forgesu, kaj cedu la lokon al tiuj pozitivaj, kiuj, ĉiukaze, estis pli multaj.



INFANOJ OKUPIS LA MUZEON

La 5-an de aŭgusto je la 16h00 en la Urba muzeo de Bjelovar estis malfermitaj du samtempaj ekspozicioj. Sur la lernejoj oni prezentis la ekspozicion *Mia unau alfabetlibro*, dediĉitan al lingvoj kaj skriboj de la mondo. Prezentiĝis 120 lernolibroj el 42 landoj kaj 70 lingvoj. La dua ekspozicio estis *La flugiloj de fantazio*, en kiu prezentiĝis iom malpli ol 300 infanaj pentraĵoj.

Enkonduke parolis **Josip Pleadin**, la festivala sekretario. La solenan malfermon partoprenis anstataŭantino de la urbestro **Valna Bastijančić Erjavec**, kiu el la perspektivo de plastikarta pedagogo parolis pri la ekspozicio de pentraĵoj, kaj la anstataŭantino de la departementestro **Bojana Hribljan**, kiu malfermis la ekspozicion.

Nome de la ekspozicia ĵurio, **Franjo Forjan**, prezidanto de Bjelovara Esperantista Societo proklamis la rezultojn kaj helpe de la vicurbeŝtrino kaj vicdepartementestrino disdonis la porokazajn medalojn kaj diplomojn al kelkaj partprenintaj malgrandaj artistoj.



**BJELOVAR
- LA URBO
FAVORA AL
INFANOJ**



Fotis Sanja Pleskina Forjan

INTERKONA VESPERO



Fotis Sanja Pleskina Forjan



Supre: La granda salono dum la Interkona vespero; la urbestro s-ro Dario Hrebak dum alparolo de la festivalanoj kaj la kantisto Dubravko Kovačević dum la prezento de Esperantaj kantoj.

Malsupre: Muzikas la rusa kanzonisto Mikaelo Bronštejn kaj dancigas la gastojn la franca duopo Frnçoise kaj Dédé.

Je la 19h00 la granda salono de la Hotelo Central estis plenplena de gastoj. La organizantoj estas aparte honoritaj per la tutvespera partoreno de la urbestro de Bjelovar, **s-ro Dario Hrebak**, kiu en la inspira parolado dankis al esperantistoj, kiuj por la festivala urbo elektis ĝuste Bjelovaron, la urbon kie harmonie kunvivas multaj nacioj kaj minoritatoj.

La programon gvidis **Slavica Lovrin**, kaj dancigis la publikon la ensemblo *Stari prijatelji* (Malnovaj amikoj).

Agrabla surprizo por la partoprenantoj estis du kantoj en Esperanto, kiujn tre plaĉe prezentis la bjelovara kantisto **Dubravko Kovačević** kun la ensemblo *Stari prijatelji*. En la programo partoprenis ankaŭ la du gastoj Francio, Françoise kaj Dédé, kaj la rusa kanzonisto Mikaelo Bronštejn.


Dum la vespero estis vendata tombolo, kaj tranĉita la torto de INTER-FEST, sponsorita de la Kafejo kaj dolĉaĵejo Zagorje.



LA VORTAREGO

Unu horon daŭris la prezento de la *Oklingva medicina enciklopedia vortaro* de Jozo Marević en la malgranda salono de la Hotelo Central. Enkonduke parolis Josip Pleadin kaj Marija Jerković, sed la plej grandan parton de la programo okupis la parolado de la aŭtoro mem.

Per bonvolemo de la aŭtoro Marević, la Festivalo proponis al potencialaj aĉetantoj duone rabatitan prezon por ĉi tiu valorega verko.



LISTO DE ALIĜINTOJ

120. Nataša Dorosulić, Sisak, Kroatio
121. Ibolya Baán, Budapest, Hungario

PUBLIKE

Koncizan programon de INTER-FEST publikigis la sendependa informilo POST n-ro 44 de aŭgusto 2017.

PARAFRAZANTE ZAMENHOFON: SAMIDEANOJ KUN SAMIDEANOJ!

Karaj gesamidanoj, karaj geamikoj, estimataj partoprenantoj kaj karaj gastoj,

Mi havas la honoron saluti vin okaze de la internacia Esperanta aranĝo – la kulturfestivalo INTER-FEST.

Tiu manifestacio okazas por la unua fojo en nia bela urbo Bjelovaro, la centro de la Departemento Bjelovar-Bilogora, kiuj volonte gastigas kaj ankaŭ plenkore aŭspicis la aranĝon.

Kiel vi certe scias, en nia urbo Esperanto havas pli ol unu jarcenton longan tradicion. Bjelovara esperantista societo hardiĝis dum la sukcesa organizado demultaj programoj, inkluzive de la 9 -a kongreso de kroataj esperantistoj, kaj kun la tempopaso la ideoj multiĝis.

Kelkaj geesperantistoj el la Bjelovara esperantista societo ekhavis la ideon organizi pli grandan kaj pli internacian aranĝon ol estis la kongreso. Kaj jen, nun ni ĉiuj kunvenin ĉi tie kun la Misio, ke INTER-FEST fariĝu rekonata eŭropa Esperanto-aranĝo kun vasta gamo da programoj, kiuj al neesperantista medio prezentos praktikan uzeblon de Esperanto kaj pere de tio instigos ĝian lernadon kaj instruadon.

En nia Vizio ni vidas la festivalon INTER-FEST kiel aranĝon, kiu volas kuraĝigi la Esperantan kulturkreadon kaj levi la prestiĝon de Esperanto en la kultura kampo.

La programoj de INTER-FEST, kiel vi vidas el la programlibro, inkluzivas diversajn branĉojn de literaturo, teatro, muziko, filmo, klerigo, lingvolernado, sed ankaŭ de interkultura interŝanŝo, turismo kaj aliaj aktivecoj, kiuj efektivigo per prelegoj, diskutrodoj, seminarioj, koncertoj, prezentaĵoj, konkursoj, kolokvoj, ekspozicioj, kaj tiel plu.

La okazigo de INTER-FEST estas dediĉita al la 130-jariĝo de Esperanto kaj la centa morto-datreveno de ĝia “patro” Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Mi estas tre feliĉa vidi vin ĉi tie, kaj deziras al ĉiuj partoprenantoj agrablan restadon. Mi deziras, ke la



Slavica Lovrin

gvidantino de la Interkona vespero
kaj ŝia parolado

festivalo fariĝu bona tradicio, kiu fortigos nian estontan kunlaboron sur kampo de kultura interŝanĝo, kiel la organizantoj difinis en sia Vizio.

Karaj geamikoj, vi alvenis el diversaj urboj kaj landoj, kaj ĉi-okaze mi deziras citi la konatan frazon de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiun li eldiris en la unua internacia kongreso de esperantistoj, okazinta en la franca urbo Bulonjo-sur-Marco en la jaro 1905.

Hodiaŭ en Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.

Tiu frazo, eldirita precize je la hodiaŭa tago, la 5-an de aŭgusto de la malproksima jaro 1905, estas tre aktuala ankaŭ hodiaŭ, kiam en la gastama Bjelovaro renkontiĝas ne francoj, poloj kaj rusoj, ne slovenoj, bosnianoj kaj serboj, sed samideanoj kun samideanoj, dank' al la komuna lingvo Esperanto.

Ĉe la fino mi deziras parafrazi niajn aŭspicantojn kaj deziri al vi multajn jarojn da sukcesa laboro kaj rekazigon de ĉi tiu valora festivalo. Kaj nun bonvolu ĝui la vespermanĝon. Bonan apetiton!